Sen palisaroj etendis sin okcidente kaj sude; Norde Blomidon' leviĝis, kaj supre arbaroj sur montoj.

Tendojn konstruis nebuloj de l' mar' atlantika potenca,

Ekrigardante la valon, sed malsupreniris neniam.

Tie en mez' de bienoj ripozis vilaĝ' akadia.

Ĝiaj el kverka trabaĵo aŭ pin' konstruitaj dometoj

Estis similaj al domoj Normandaj ĉe tempoj Henrikaj.

Pajlategment' kun fenestroj kaj kun elstaranta facado

Super la subetaĝo, protektis kaj ombris eniron. Tie ĉi en la trankvilaj vesperoj someraj, ĉe tempo

Kiam la sun' subiranta heligis la straton vilaĝan,

Kiam la ventoflagojn sur la kamentuboj ĝi oris,

Sidis virinoj, fraŭlinoj kun ĉapoj neĝblankaj, en vestoj

Bluaj, skarlataj, kaj verdaj, kaj ŝpinis sur siaj ŝpiniloj

Por la teksil' babilema la orflavan linon. Bruantaj

Dome navetoj son-miksis kun radturniĝadoj kaj kantoj.

Nun paroĥestro alvenas laŭlonge la strato; infanoj

Ludojn ĉesigas, kaj kisas la manon benantan de l' pretro.

Inde li interpromenas. Virinoj, knabinoj leviĝas,

Proksimiĝanton salutas per vortoj de koraj salutoj.

Venas la kamplaboristoj al hejmo, la suno kuŝiĝas,

Kaj la krepusko superas. Samtempe el sonorilejo

Sonas l' Anĝelo mallaŭte, kaj super vilaĝaj tegmentoj

(Continued on page 6.)

GARDENURBO—GARDEN CITY

(El la Brita Esperantisto, Maja numero.)

La *Garden City Association* (Gardenurbara Asocio) fondiĝis en la jaro 1899 kun la celo efektiviĝi la principojn, kiujn rimarkigis S-ro. Ebenezer Howard en sia libro, "*Garden Cities of To-morrow*" (Morgaŭaj ĝardenurboj). Ĝi estas nepartia kaj nesekta asocio, kiu rilatas al la plej altaj idealoj de la homaro kaj celas la definitivan solvon de la problemo pri la enloĝigo de la popolo, malpliigante kaj malhelpante egale la teruran trodenisiĝon de popolo en la urbojn kaj samtempe ĝian forlason de la kamparo. Se iu deziras koniĝi pli detale kun la principoj kaj projektoj de tiu asocio, li skribu, angle aŭ Esperante, rekte al ĝia Sekretario, 602, *Birkbeck Bank Chambers, Holborn, London, W.C.* Sed en la nuna artikolo oni nur priskribas por la ordinara leganto la progreson, kiun jam faris la unua granda eksperimento de tiu asocio, nome la Unua Gardenurbo apud Letchworth en graflando Hertford. Oni diras, ke la Kongresa Komitato intencas aranĝi ekskurson el Cambridge dum la venonta Esperantista kongreso por viziti tiun interesan Gardenurbon, en kiu jam de longe estas fondita entuziasma Esperantista grupeto, kies sekretario estas Sro. P. D. Hugon.

Se ni povas akcepti la diron de kelkaj saĝaj homoj, ni devas kredi, ke estas neeble krei sur la kamparo urbon laŭ volo kaj laŭ plano antaŭe projektita, ĉar urboj kreskas per si mem kaj ne estas krebblaj. Tiaokaze ni egale devas kredi tion, kion konstatas tiuj samaj homoj, ke artefarita lingvo estas neblaĵo; tamen ni jam posedas tian lingvon, kiun per ĉiutaga sperto ni trovas taŭga por ĉiuj rilatoj de la vivo; kaj tiel same ĉiu, kiu vizitas la Gardenurbon trovas tie veran urbon kun veraj domoj, stratoj, fabrikoj, loĝantoj, kiuj perlaboras sian vivadon laŭ la plej diversaj manieroj aŭ ĝuas la gajnon de siaj antaŭaj okupoj.

Antaŭ tri jaroj, aŭ pli precize en la aŭtuno de la jaro 1903, areto da Londonaj kaj provincaj ĵurnalistoj, ĉe la invito de la akcia kompanio de la Unua Gardenurbo, vizitis la ĵus akiritan bienon enhavantan preskaŭ 4,000 akrojn (1,600 hektarojn) proksime de Hitchin. En tiu tempo ŝajnis al multaj ĉeestantoj neeble imagi la starigon de moderna urbo sur la ondanta vaston de terkultura tero, kiun ili la unuan fojon vidis tra densa pluvego. De tiu tempo, tamen, oni metis sur ĝin multegon de efika laboro kaj el la sekvantaj detaloj estas evidente, ke la Gardenurbo apud Letchworth

jam nun forpasis el la sfero de spekulacio en tiun de certigita sukceso.

Ekster la graflandaj vojoj antaŭe ekzistantaj oni estas konstruinta pli ol 4½ mejlojn (7.2 kilom.) da novaj vojoj kaj oni sternis sub la tero 14¼ mejlojn (23 kilom.) da akvaj ĉeftuboj, 8 mejlojn (12.9 kilom.) da gasaj ĉeftuboj kaj 8 mejlojn da defluilaj ĉeftuboj. Oni ankaŭ konstruis akvoprovizejon, gasfabrikejon kaj grandan flankvojaron (por ŝarĝado de vagonoj) en rekta komuniko kun la Granda Norda Fervojo. Oni jam luis aŭ elektis terpecojn por la konstruado de 520 domoj, 25 butikoj, 12 fabrikejoj, du preĝejoj, publika halo, lernejoj k.t.p.

Konstruajoj ĝis kapitala valoro de £162,000 estas aŭ jam faritaj aŭ nun konstruataj. La akcia kompanio mem jam konstruis ĝis la valoro de £6,500.

La nuna provizo de akvo estas sufiĉa por urbo de 6,000 loĝantoj, kaj la gasfabrikejopovas elmeti po 6,000,000 kubfutoj da gaso en ĉiu jaro. Ambaŭ tiuj ĉi provizejoj povas esti facile pligrandigitaj. Ĉirkaŭ 400 domoj estas jam alligitaj al la akvoprovizo kaj al la gasoprovizo kaj la nombro ĉiutage kreskas.

Dek fabrikistoj jam konstruis aŭ nun konstruas siajn fabrikejojn sur la bieno kaj du aliaj elektis terpecojn en sama celo.

La popolo loĝanta sur la bieno atingis ĉirkaŭ 2,000 personojn, sed en la fino de la somero de 1907, kiam ĉiuj diritaj fabrikejoj estos komencaj la funkciadon, la nombro kredeble atingos la ciferon 4,000 aŭ eĉ 5,000.

Ĉe tiel rapida kreskado ĉe la industria loĝantaro, la demando de konvena domprovizo fariĝis preskaŭ problemo. Ĝis nun la ĝisnunaj konstruistoj kaj arĥitekturistoj povis plenumi la postulojn por novaj domoj, sed pro la granda pliiĝo de konstruataj fabrikejoj kaj la granda alfluo de industriuloj al Gardenurbo estas evidente, ke la nunaj rimedoj tute ne sufiĉas por provizi tiom da dometoj je plimalgranda luprezo, ol la ekzistantaj, kiom oni bezonos. Tiel grava kaj urĝa fariĝis tiu ĉi afero, ke la Direktantoj de Unua Gardenurba Kompanio nun formigas apartan helpan kompanion speciale por provizi la bezonatan loĝejaron. En tiu ĉi kompanio la Gardenurba Kompanio alprenos ĉiujn ordinarajn akciojn, sed lasos proponi al la publiko la 4 % 'ajn preferencajn akciojn garantiitajn de ili mem. Ĉe tia granda postulo por novaj domoj, cetere nepre kaj kon-

stante kreskonta, la antaŭvido de la nova kompanio certe ŝajnas bela.

Pro la alveno de tion da novaj fabrikantoj la Granda Norda Fervoja Kompanio, trovante sian flankvojaron tro malgranda, ĵus aĉetis ĉe la Gardenurba Kompanio ankoraŭ 13 akrojn (5.26 hektarojn) da tero por konstrui novan komercan vagonejon kun flankvojoj oportune disponitaj por konduki la vagonojn rekte ĝis la pordegoj de la fabrikejoj, tiel malpligrandigante ĝis minimumo ĉiun prokraston tiel en la ricevo, kiel en la elsendo de komercaĵoj.

En la mallonga spaco de tri jaroj oni atingis tiun transformon de ses kvadrataj mejloj el la karaktero de terkultura tero en kernon de prospera industria kaj loĝeja urbo, sed estas kompreneble, ke multego ankoraŭ restas por fariĝi antaŭ kiam Gardenurbo atingos sian maksimuman loĝantaron, 35,000. Societa vivado jam organiziĝas sur la bieno kaj en la ĵus pasinta vintro aperis rimarkinda plifortiĝo de la aktivecoj societa, intelekta kaj religia. Oni jam aludis la Esperantistan grupeton, al

kiu aliĝis Sro. Ebenezer Howard la fondinto de la Gardenurba projekto.

Gardenurbo difinis por si gravan taskon, nome konstati, ke laŭ la komerca vidpunkto estas profitdona konstrui urbojn laŭ la principoj de antaŭvidemo kaj de precizaj metodoj, plimulte ol laŭ la laŭhazardaj metodoj de la plimulto el niaj urboj kaj urbegoj. Per tio, ke ĝi planis la urbon tuj de la komenco, Gardenurbo povis kaj konstante povos eviti la plimulton el tiuj malbonoj rilate al la trodensiĝo de la popolo kaj la konsekvenca malsanemeco, kiuj tiel terure influas sur la vivon de la laboristoj en la tro dense loĝataj urboj.

La influo de tiu ĉi grava societa eksperimento jam disvastiĝas tra la lando, kaj oni jam penas alpreni la principojn de la gardenurba ideo en almenaŭ duondekduo da urboj en diversaj partoj de la lando. Oni povas esperi, ke tiuj ĉi atingos ĉiuj eĉ pli grandan prosperon, ol rezultas de la penoj de tiuj, kiuj unue elpensis la ideon de la Gardenurbo apud Letchworth.

ALFRED E. WACKRILL.

SPECIAL NOTICE TO MEMBERS OF THE AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION

According to the Constitution and By-laws of the Association, printed in the July number of the *Journal*, all nominations for members of the Council must *reach* the Secretary of the Association before November first. *Furthermore, all nomination papers must be signed by five members.*

Nominations for the President and for the four General Councilors can be made by all members of the Association.

Nominations for the three Special Councilors can be made only by persons holding certificates of Kapableco from recognized National Associations.

Nominations for Delegate Councilors, one for each section of the country (East, Central States, South, and West), can be made only for that section of the country in which the nominators live. The East takes in everything east of the State of Ohio and north of the Potomac.

The Central States are those touching the Great Lakes, the Upper Mississippi, and the Missouri, including the State of Missouri. The West means the Rocky Mountain States and the Pacific Coast.

When making your nominations, please use some such form as follows:

President (*one* name).....
 General Councilors (*four* names).....

 *Special Councilors (*three* names).....

 Delegate Councilor (*one* name).....

* (To be made only by Atestuloj pri Kapableco). Do not forget the by-law which requires the nomination papers to *reach* the Secretary of the American Esperanto Association, Boulevard Station, Boston, Mass., *before November first*. Better send them *now*.

EPITAPH ON AN INFANT

(El la Brita Esperantista.)

Ere sin could blight or sorrow fade,
 Death came with friendly care;
 To heaven the opening bud conveyed,
 And bade it blossom there.

—COLERIDGE.

Ankoraŭ ne sentintan la malbonon,
 Ankoraŭ ne velkantan pro doloro,
 Amika Morto portis la burĝonon
 Ĉielen, por fariĝi tie floro.

—J. C. R. (10,381).

VIZITO AL KINGEGAN

La Renkontejo de la Nova kaj Malnova Mondoĵ.

(Verkis sia mosto ^{see photo, photo in Appendix 16} James Wickersham, ĵuglito por la distriko Alaska, tradukis Richard H. Geoghegan, en Fairbanks, Alaska)

Minacante de malvarmeĝo kaj lacigo mem la ekziston, nin trapikis akra januara ventego, kiu landen rapidis trans la arktika glaciomaso de la markolo de Beringo (Bering Straits) kiam, la unuan fojon, ni ekatingis la promontoron de la Princo Gvaluja (Cape Prince of Wales). Foren faletante, super la disrompitaj glacitabuloj, alten ŝutitaj laŭ masegoj angulaĵoj ĉe la piedo de la griza montomuro; ĉirkaŭtordate kaj blindigate de la volvema kaj siblo bolanta blovaĵo de neĝo kaj hajlneĝo; kun la vido detranĉata per nepenetrebla nebulo; pugnate kaj batate de la sovaĝaj elementoj; ni povis nur fidi kaj sekvi tiun bonan kunvojaĝanton kiu, kun esceptato de la virino, estadas al la homo la plej malnova kaj plej fidela servisto—la hundo. Gvidate de lia saĝeco kaj neniam eraranta instinkto, ni sukcesis transpasi la promontoron kaj eniri la multamatan multblovatan vilaĝon Kingegan.

Tiu ĉi antikva urbo eskima sin niĉas malantaŭ la norda deklivo de la triangula montomaso en kiu konsistas la promontoro de la Princo Gvaluja, kaj borderas ambaŭ flankojn de sola strato, kiu sin streĉas paralele kun la marbordo. Ĝia nomo defluas de la eskima vorto "kingiktak," alta, kaj nepre aludas la proksimecon de la vasta promontoro al tiu ĉi nordula hejmeto.

La arĥitekturo estas, ĉe la eskimoj, arto ne antaŭen progresinta, sed ĝiaj tipoj entute akordiĝas kun sia ĉirkaŭaĵo. Kvankam la granda duoninsulo, kies plej okcidenten kuŝanta parto formas la promontoron de la Princo Gvaluja, sin trovas tute senarbajan, la marbordon, tamen, ĉirkaŭ la promontoro kaj norden malproksime, plenkovras flotintaj lignaĵetoj el la rivero Jukono (Yukon), kiuj prezentas al la enlanduloj superfluan da konstrumaterialo kaj hejtontaĵo. La daŭremaj arĥitekturaj tipoj estas: la loĝejo, la "kozga" aŭ dancejo, la kaŝejo—eŝafodeto por altigi la manĝaĵon for de la atakoj de hunda englutemo—kaj la somera tendo.

Dum mia mallonga studado de la ĉiutaga vivo de la Kingegananoj, mi vizitis ĉiun vivejon de la vilaĝo kaj pasigis multajn postmeztagojn kaj vesperojn en la dancejoj. Kaj la

loĝejo kaj la dancejo estas subteraj, entombigitaj en la sablomontetojn; la aliaj tipoj, kontraŭe, estas konstruitaj surtere. Akceptote ĉe familio eskima, vi forpromenas sur la tegmentoj de la domoj, ĝis vi atingas la vivejon de viaj gemastroj, kaj alvenas la pordon de supre. Ĝi staras ĉiam malfermita, ĉar ĝi estas nur trifuta kvadrata truo. Oni enfaligas la piedojn, mallevas sin per la manoj, kaj tuj sin trovas sur plataĵo, kvar futojn sube de la enirejo. Turnu vin dekstren kaj desaltu de la plataĵo—vi estas en la salono, kies sola lumajaĵo penetras tra la pordo per kiu vi ĵus aliris. Pakaĵoj da feloj, balenkaptilaroj, sakoj da viando, fiŝlogiloj, neĝoŝuoj, pafiloj kaj aliaj bezonataĵoj de la ĉaso kaj de la hejmo ornamas la murojn. La salono mem estas konstruita de ŝtupoj vertikalaj, trezoroj el la rivera alflontantaĵo; ĝia tegmento estas de tiuj samaj kun superteĝo de sablo kaj neĝo. Dekstre, ĉe la fino de mallonga malluma aleeto, malgranda pordo gardas subteran ĉambron, lumata de unu radio per fenestro fokintesta,—jen la familia manĝaĵejo.

Maldekstre, trapalpetinte similan koridoron, vi trafas duan ĉambron, kun truo por akceli fumeliron kaj envenon de lumo. Tiu truo estas nigriĝinta de la fumo kaj fulgo de multjaraj, ĉar tie ĉi vi rigardas la kuirejon. Eble, al la vizitanto okazos ŝanco kiel la mia egale feliĉa, kaj li trovos ekzemplerojn de la "iggan," vastaj kaldronoj de malglatigita argilo, uzitaj de la raso antaŭ ol la balenkaptistoj portis al ĝi kuirilojn kaj potojn de kupro kaj de lado. Returnante sin en la salonon, kiu estas pavimita de rondiĝintaj vertebroj de balenoj, la gasto rampas laŭlonge ĝian centran branĉon, la tegmento fariĝante ĉiam pli kaj pli malalta, ĝis fine li haltiĝas, restante sur la manplatoj kaj genuoj, antaŭ kurteno de haŭto nordcerva. Tiu kaŝas truon, havantan dekok kolorojn de grandeco kvarangule, kaj sin trovantan ĉirkaŭ unu futon pli alte ol la planko sur kiu oni genufleksas. Deŝovinte la kurtenon, puŝu al vi la kapon tra la malfermaĵon, kaj ekaperos . . . ĉarma modelo de muso kiu ekrigardetas al peco de fromaĝo.

La loĝejo formiĝas el sola ĉambro, kies or-

dinara mezuro estas dekkvar futoj kvadrato. Ĝin beligas unu fenestro, de fokintesto streĉita kaj alkudrita al kadro kiu kuŝas en la tegmento. Estas ĝentile eniri sen frapi; vi ne surprizos Dianon en ŝia banilo—ne en Kingegan. La diinon vi eble ja trovos enmeze ŝia tualetto, sed ŝi ne estas nervoza. Eniru tial, kun via plej gracia mieno,—se tian mienon vi scias konservi rampanta. Mankas seĝiloj; sekve, se vi estas tro rigida por sin sidigi sur la planko, la kruroj krucitaj kiel vera mongolo, estas necese ke vi staru.

La ĉambro posedas belan ebenan plankon, laboregeme elhakitan el flotintaĵo per eskima dolojro (adze). Per uzo longa kaj poluro konstanta ĝi estas tiel glata kaj pura kiel la planko de via propra kuirejo, sed elhaladzas odoron amoniakan de pikemo fortega. Preter la muro, rekte kontraŭ al la truo per kiu vi alvenis kaj kvar futojn pli alte ol la planko, staras la lita plataĵo, kvin futojn larĝa. Sur tin sin montras roboj mole pretigitaj el haŭtoj de nordaj cervoj, kiuj formas la litaĵon de la loĝantoj; sube estas pakitaj la vestoj, pladoj, iloj, kaj aliaj hejmaj uzaĵoj, kaj ofte, belegaj lignaj skatoletoj, la kovriloj inkrustitaj (inlaid) per ĵado (jade) aŭ ŝategaj perloj de turkizo, el kiuj mi iaforte eltiris dolĉavoĉajn sibirajn sonorilojn, jarcenton maljunajn kaj portantajn ĉirkaŭ la randoj piajn surskribojn ruslingvajn.

La edzino sidas sur la planko, apud la muro, ĵus sub la ekstera bordo de la lita plataĵo, diligente okupata je elfaro de haŭtaj botoj, vesto kun alligita kapuĉo, aŭ pantalone de cerva haŭto. En tiuj ĉi tri artikoloj konsistas la vestaĵo de la Kingegananoj, kvankam la fasono de la vesto estas iom malegala laŭ la sekso de la portanto, la vira estante altranĉita kvadrato ĉirkaŭen, sed la virina pli longe antaŭe kaj malantaŭe ol ĉe la flankoj.

Se la edzo ĉeestas, vi lin vidos en simila pozicio apud la kontraŭa muro, kie li gravuras el eburo (ivory) de rosmaro iun el la multnombraj artobjektoj kies formojn li heredas de tiuj prapatroj kiuj loĝis en la fruaĝaj kavernoj de Francujo, Germanujo kaj Britanujo. La gvidetoj kredeble restas ekstere, kie, sur haŭto de blanka urso, ili glitadas malsupren de ia kruta neĝamaso; aŭ, sin trovante en la loĝejo, mordetas frandaĵon da tomkodo frostigita (malgranda gado) aŭ eĉ pli sensignifan ĉasaĵon. La hejmo eskima ampleksas ĉion, kion demandas la klimo kaj deziras la enlanduloj; kial la homo demandus pli multon?

Finiĝite la vintro, la longa varmo somera de la arktiko ekpelas la enlandulojn el la subteraj vivejoj, kaj ili transloĝiĝas en tendojn preter

la morbordo; estas tiam sezono por ĉiuj, sed aparte por la infanoj, felicega kaj gajega.

La "kozga" aŭ dancejo estas loko de kunveno por la viroj; virinoj neniam apudeblas tien escepte tiam, kiam oni invitas ilin al danco, festeno aŭ alia publika ceremonio. En Kingegan estas du dancodomoj, unu en ĉiu ekstremaĵo de la vilaĝo. Enirinte la ĉefsalonon tra pordo vertikala, kaj malsupren paŝinte tri kvar ŝtupojn, vi vin trovas en granda arkita ĉambrego, kvardek futojn longa kaj dekdu futojn larĝa. La superkonstruo estas de ripoj de baleno, superarkitaj per grandaj glaciaĵoj altiritaj de la marbordo. Jen estas sidejaro, jen bretoj por kelkatempa provizaĵo. Ĉe la malproksima fino de la longa salono, malsupren faletante unu du ŝtupojn, la gasto envenas malaltan malluman koridoron, ĉe kies finiĝo li rimarkigas sin je ronda malfermaĵo, rekte super la kapo. Sin levinte, li konstatas ke la kapo kaj ŝultroj enestas ĉambregon kaj, paŝante sur balenen vertebron povas, sidante sur la plankon, sin levi en la kozga'n. Tiu ĉi ĉambro estas kvadrato de dudek kvar futoj, kun "koksita" tegmento, en kies mezo lokiĝas granda bela superkapa fenestro fokintesta.

La kozga estas vere dediĉita al la viroj; ĝi estas por ili klubo, metiejo, vetludejo, gimnastikejo, teatro—en unu vorto, la sola domo de publika kuniĝo kiun povas fanfaroni la vilaĝo, kaj estas pretigita kaj subtenata de la komunumo. Eniru tage kaj vi vidas ĝin plene en de viroj; jen iu kiu gravuras rosmardenton, jen alia kiu flikas glitveturilon aŭ fiŝkaptilon, jen tria kiu tondas al kunulo al hararon. Laŭ kutimo eskima oni tondas la verton kaj lasas la harojn ĉirkaŭ la bazo de la kapo resti longaj, pro tio ke kvankam la verto ne estas tro varma sub la kapuĉo, tamen la longa franĝo ĉirkaŭ la malsupra parto servas por gardi la vizaĝon, kolon kaj orelojn kontraŭ la frosta malvarmo.

Tiu grupo apud la granda platlampo, plena je fokoleo kaj briletanta de varmo kaj lumo ĉe la meĉo muska, sin gajigas per la fama amerika kartludo "pokoro," vetbatalante kapsulojn, kartoĉojn, elektitajn pecojn el eburo, aŭ felojn de urso aŭ de vulpo, laŭ la turniĝo de karto. Alia penego elfrotas gravuraĵon: labredon (ornamaĵo portata en truo tra la malsupra lipo) aŭ kuleron de la malmola kaj krevema ĵado blanka aŭ verda—ŝtono multkosta trovata en la riveroj kiuj fluadas de oriente en la markolon Kocebuan (Kotzebue Sound). Ĉiuj diligentas je siaj diversaj laboroj, ĝis iu proponas ludon de "alten piedbati." Tiam ekkomencis la amuzaĵo! Oni pendigis ruleton el drapo ses futojn alte de la planko, per ŝnuro

falanta de la plafono, kaj unu apudestanto post alia malantaŭen paŝinte, balancis sin sur unu kruro, foren saltetis, supren saltis, kaj alcelis la pilkon per ambaŭ piedoj. Iom post iom oni altigis la celaĵon, sed kelkaj sukcesis bati la ruleton per ambaŭ piedoj eĉ tiam kiam ĝi pendis sep futojn super la planko. Poste, ŝnurego estis streĉata kaj sur ĝi la lertuloj prezentis laŭvice farojn de forto vere surprizajn. Dum ĉiuj ĉi atletadoj, la konkursantoj estis nudaj ĝis la zono kaj la bronzetaj haŭtoj feliĉe elmontris la glore ekzercitajn muskolojn.

La funkcioj societaj, tamen, en la "kozga," estas la plej interesa trajto de la hejma vivo. Ni estis invititaj de Okbaok, la juna ĉefulo, apudesti akcepton oferotan de la "sojituak," la korpuŝo de tamburistoj, al siaj amikoj. Suprenpuŝinte la kapojn tra la plankon, ni miris nin trovi rigardantajn grandan ŝtonan lampon, la malantaŭ ĝi aranĝitajn tamburistojn, kaj post ili vicon de kantantoj, ĉiuj senvestaj ĝis la umbiliko. Bronzaj ŝultroj plenigis la kozgan, escepte malgranda spaco malantaŭ la muzikantaro, kie estis rizervata por ni la sidejo de estimego. Neokupata estis la muro okcidenta, sed ĉiun alian colon da spaco enpakis la eminentularo de Kingegan. Tuj kiam ni sidigis, la tamburoj elsonoris, kanto sin levis agorde, kaj la balo estis malfermata.

Ĉiu rigardo sin algluis al la truo enveneja en la planko kaj, antaŭ ol elspeziĝis la unua pulmoplenero da kanto, aperis eskimo en bela vesto de makulata haŭto de norda cervo, lin sekvante lia egale belornamita edzino. Turnante la vizaĝojn ĝis la tamburistoj kaj aŭdantaro, ili komencis kanton de saluto gratula, akcentante per danco la takton de la muziko. Sendube ili estis modeloj de la fasono, ĉar lia labredo formiĝis de rondaĵo de plado porcelana kun granda blua perlo en la mezo, kaj la bluaj strioj sur ŝia mentono tatuata krevigis de envio la korojn de la alestanta sinjorinaro. Dum la kanto kaj danco plivarmiĝis, almiranto atleta kaj laŭtavoĉa forsaltis en la spacon apud ili, la bronzaĵojn brakojn muskolajn svingante laŭ la ritmo muzika, kaj rakontis fanfaroneme la laŭdojn de la gedandoj dancantaj. Du mallongajn kantojn kaj dancojn—kaj la unua paro cedis la plankon, sin detirante al la muro okcidenta, kie ili ripoziĝis; li, demetinte la suprajn vestojn, sur la alta benko, kaj ŝi sur la planko. Alia danco kaj kanto, kaj alia danca duero; ankoraŭ alia, fojon post fojo, ĝis dudek paroj el la alta societo de la ĉefurbo eskima estis dance akceptitaj. Tiam la muziko ĉesis kaj la tamburistoj kaj kantantoj, sin levinte, detiris de sub la seĝaro potojn kaj kaldronojn da elek-

titaj manĝotaĵoj—haŭto de blanka baleno, viando de rosmaro, frostigita tomkodo, kokso de norda cervo, kaj aliaj frandaĵoj de la nordlando, kiujn ili transpasis al siaj amikoj. La festeno komencis ĉe lia moŝto sur la alta benko, kiu, fininte la manĝon, transpasis la restaĵojn malsupren al la belulino sur la planko; tion kion ŝi ne uzis ŝi konservis por hejmen porti. La duero kiu envenis unue tiam prenis dance la forpermeson, kaj tiel intersekve ĝis la lasta ĉiu sin deirigis laŭ la ordo de sia veneno. Tiel forpasis nia unua akceptado en Kingegan.

La markolo de Beringo estas larĝa nur kvindek mejlojn. De la nivelo de la maro apud Kingegan, ian ajn belan tagon, oni povas klare ekvidi la Orientan Promontoron (East Cape) de Sibirujo kaj la insulojn Diomedajn, kiuj lastenomitaj ŝajnas esti nur du tri mejlojn for de la marbordo kvankam, en efektivo, ili kuŝas meze la kanalo. Nenia loko estas pli interesa por la studento de amerika etnologio ol tiu ĉi mongola transirejo. Per vojaĝo, somere nur unutage, la flavhaŭta, nigra dikan senbuklan hararon portanta, senbarba mongolo povis transiri tiun ĉi mallarĝan akvaraĵon kaj liveri al Amerika senhoma la elementon homplenigeman. Tion li efektivigis ĉirkaŭ la dudek-dua tago de junio antaŭ jam kvin mil jaroj. La unua komerco inter la malnova mondo kaj la nova oni traktis tra la vilaĝoj eskimaj apud Kingegan, la insuloj Diomedaj kaj la Orienta Promontoro; ĝi ankoraŭ floradis tiam, kiam la rusaj kazakoj (Cossacks) atingis tiun regionon en la jaro 1711a. Starante sur la rando de la tero firma du mejlojn de antaŭ Kingegan, mi rigardis ravite grandan oceanan riveron el glacio, norden kuregantatan en la marojn ĉirkaŭpolusajn. Tiel malproksimen kiel povas atingi la okulo, la fluo antaŭenportadas, inter Kingegan kaj la Diomedinsuloj, vastajn tabulojn kaj amasojn da glacio multpeza. Sur tiu glacikampego la enlanduloj ĉasas la fokojn kaj, portante malgrandan pezan neĝoŝuon, povas transiri multajn pecegojn el glacio kiuj ŝajne estas tro perfidaj por toleri la pezon de homstado. Sur tiu flotaĵo ili ja ofte faris vojaĝojn nevolontajn inter Azio kaj Ameriko. Dum ni apudestis la promontoron, enlandulo estis elŝirata de tiu ĉi glacirivero kaj ĉiuj certigis nin ke li sendifekte aliris la Diomedajn aŭ la Orientan Promontoron. Dum la vintro de la 1892a jaro, la markolo estis ŝtopata de glacio naĝanta kaj tute glaciigis; la popolo de Kingegan tiam transiris glitveturile Sibirujon por aĉeti tabakon.

Mallonge: zorgema studado de la kondiĉoj ĉe tiu ĉi praaĝa trairejo montras pruveme ke

estadis ĉiam eble ke la loĝantoj de ĉiu marbordo sin atingu reciproke. Ekzistas neniam barilo al la fluo de popolaĵo de Azio Ameriken per la markolo de Beringo.

La ŝtambastoneto de la eskimoj, ilia nacia kaj plej utila armilo, estas uzata de Attu, la plej malproksima el la insuloj Aleutaj, ĝis la plej suda ekstremaĵo de Grenlando. Ĝi estas identa kun la "atlatl" per kiu la aztekoj ŝetis siajn ponardegojn obsidiane pintitajn sur la fervestitan sekvantaron de Kortezo (Cortez); la aztekoj, kiel la eskimoj, portis labredojn tra la lipoj; la "kozga," la tipa kunvenejo de la viraro eskima, estas praktike tia sama kia la "kiva" de la sudolando; la indianoj preter la rivero Jukono parolas lingvon stapaskan tian kian la navahooj (Navajo) kaj apaŝoj (Apache), kaj rilatas al la eskimoj tiel same kiel tiuj sudaj rabistoj al la aztekoj; postsignojn de la azteka glavo "macana" kaj de la fasono platigi la frunton oni povas eltrovi malproksime norden laŭlonge la marbordo pacifika; kaj la ŝado estis bonkonata, multuzata kaj forte ŝatata de ambaŭ rasoj. Demando interese: kion kunhelpas tiuj ĉi frapantaj similecoj, ne dividitaj kun iu gento loĝanta oriente de la Montoj Stonegaj (Rocky Mountains), pravi rilaton aŭ kontakton inter tiuj ĉi du mirindaj popoloj?

La monta maso kiu formas la granitan promontoron de la Princo Gvaluja havas konturon triangulan, ĉiu el la kruroj de la triangulo estante longa ĉirkaŭ du mejlojn, kaj la plej okcidenta ekstremaĵo sin forŝovante en la markolon Beringan. De cent mejloj sude, dum nia veturado promontoren, ni admiris la graciforman konuson en kiu konsistas ĝia plej alta pinto, kaj ni nun preparis por surrampi ĝiajn murojn granitajn kaj ĝui la malofte gajnatan pejzaĝon de la supro. Tri el nia partio forlasis la vilaĝon tagiĝe kaj, longe deflankiĝinte

ĉirkaŭ la bazo de la monto, preterpasis la antikvan enterigejon de la Kingegananoj kaj forvenis sur la pli malalta nivelo de la monta deklivo. Supregen de tie estis rampo facila, kaj tagmeze ni staris 2,600 futojn super la marnivelo, sur la verto de tiu ŝtonamaso kie, genufleksante, la filino de Herodiaso levis vizaĝon senesperegan por rigardi la formon de la Hebreo Vagama, kiu staris sur la terfino orientazia.

Nek ŝin nek lin vidis ni, filoj senfantaziaj de la jarcento dudeka, sed ni vidis ja tion kio ankaŭ estas de nemultaj rigardebla—la mondojn novan kaj malnovan per unu turno de l' rigardo, Azion kaj Amerikon en okulĵeto sola. Ni nin trovis sur tiu masego kontinenta kiu foretendas ĝis la markolo Magelana (Straits of Magellan), kaj antaŭ ni kuŝas tiu fratkontinentaro, kies ekstremaĵoj estas en la malproksimegaj promontoroj de Azio, Eŭropo kaj Afriko. De la marbordo sudamerika ĝis la duoninsulo malaja, laŭ la linio de la ekvatoro, estas ĵus unu duono de la tergloba ĉirkaŭo; tie ĉi, kontraŭe, la kontinentoj ŝajnas esti disigitaj nur laŭ ĵeto de ŝtono. Mezkanales trankvilas la dunaskitaj insuloj Diomedaj, paŝoŝtonoj por la migranto mongola en lia veturo novamonden. Ĝis lim' suden, sunbriletante, ripozas la maro Beringa, sur ĝia brusto helblanka la insulo turkiza de l' Reĝo; ĝis lim' norden, glacitabuloj rapidas tra vojoj bluaĵaj, konkurse celante poluson, senĉese, senfine, senhalte.

Starigante stangon inter la ŝtonegoj de la montapinto, ni elfaldigis la stelojn kaj strekojn de la standardo patruja; laŭtavoc'e trifojne salutis; kaptis, ankoraŭ unu fojon, en ĉion ampleksaman rigardon, la tutaĵon de tiu panoramo kalejdoskopa, kiun rigardante la okulo neniam enuiĝus, kaj turnis orienten la vizaĝojn ĝis la neĝebenejo senliman silentan.

The Blind at the Congress. One of the most interesting sections of the Congress is that devoted to the blind. It is believed that Esperanto will prove of enormous pleasure and benefit to those who have unfortunately lost their sight, as it will widen their range of interest, particularly in literature. A blind man knowing only one language is, of course, confined to the few books that have been "Brailed" in that language. Books "Brailed" in Esperanto, however, would be intelligible to the blind of all nations.

There are no fewer than seventeen "blinduloj" attending the Congress this week. Five come from France, two from Switzerland, two from Denmark, three from the United States,

one from Holland, one from Germany, and three from England. They are housed together, and are under the care of Professor Cart, whose attentions to his protégés are untiring.—*(Cambridge Daily News.)*

Special Conventions. Catholic Esperantists.

Convention for the translation of the Bible into Esperanto.

International Music Society.

International Peace Society.

Marista Ligo (Naval League).

Tutmonda Labora Societo (World Society of "Labor").

British Esperantist Medical Group.

Esperantist Chess Players.

LA MALJUNULO KAJ LIA AZENO

An old man and a little boy were leading an ass to the next market-town to sell. "This man is a fool," said a man upon the road, "he and his son are trudging on foot, that the ass may go light." Having heard this, the old man set his son upon the ass and went whistling by the side of him. "Why!" cried a second man to the boy, "is it fit for you to be riding, while your old father is walking on foot?" The father, upon this rebuke, took down his boy from the ass and he himself mounted. "Do you see," asked a third, "how the lazy old knave rides along upon his beast, while the poor little boy must walk and almost cripple himself!" As soon as the old man heard this, he made his little son sit behind him. "Honest friend," spoke a fourth man to him, "tell me whether this ass is yours?" The old man said: "Yes, sir." "One would not have thought so," replied the other, "because you load him so unmercifully. You and your son are better able to carry the poor beast, than it can you." "Anything to please," said the owner. Alighting he and his son tied the legs of the ass together, and by means of a pole endeavored to carry it upon their shoulders over the bridge leading to the town. This was so entertaining a sight that the people ran in a crowd to laugh at it, till the ass, beginning to feel a dislike to the over-complaisance of his master, tore asunder the cords that tied it, slipped from the pole, and tumbled into the river. The poor old man was ashamed and vexed that by having been willing to please all he had pleased nobody, and had lost his ass into the bargain.

Maljunulo kaj knabeto alkondukadis azenon al la proksima vendurbo por ĝin vendi. "Tiu ĉi homo estas simplanimulo," diris viro sur la vojo, "li kaj lia filo piede treniĝas, por ke la azeno iru senŝarĝite." Tion aŭdinte, la maljunulo sidigis sian filon sur la azenon, kaj fajfante iris flanke de li. "Ho!" dua viro ekkriis al la knabo, "Ĉu konvenas por vi rajdi, dum via maljuna patro iras piede?" Post tiu ĉi riproĉo la patrio malsuprenigis la knabon de la azeno kaj li mem sursidiĝis. "Ĉu vi vidas," tria demandis, "kiel la mallaborema maljuna fripono rajdadas sur sia besto, dum la bedaŭrinda malgranda knabo devas marŝi kaj preskaŭ kripliĝas." Tuj kiam maljunulo tion aŭdis, li sidigis sian filon post li. "Bona amiko," alparolis al li kvara homo, "diru al mi, ĉu tiu ĉi azeno estas la via?" La maljunulo diris: "Jes, sinjoro." "Oni ne estus pensinta tion," respondis la alia, "ĉar vi ĝin ŝarĝas tiel senkompateme. Vi kaj via filo pli bone povas porti la bedaŭrindan beston ol ĝi vin." "Ion por plaĉi" diris la posedanto. Malsupren saltinte, li kaj lia filo kunligis kune la krurojn de la azeno, kaj per stango penis ĝin porti sur siaj ŝultroj trans la ponto alkondukanta al la urbo. Tio ĉi estis vidaĵo, tiel amuzanta, ke la popolo amase kunkuris por ridi je tio ĝis la azeno, eksentinte antipation kontraŭ la trokomplezo de sia mastro, rompis la ŝnurojn, kiuj ĝin ligis, defalis de la stango, kaj renversiĝis en la riveron. La malfeliĉa maljunulo hontis kaj ĉagreniĝis; ĉar, volinte plaĉi ĉiujn, li plaĉis nenium, kaj krom tio perdis sian azenon.

A. KRAFFT (Chicago).

(All beginners should study this story carefully, paying especial attention to the *participial forms* and to the suffixes *ig* and *iĝ*. Study carefully the grammatical explanations in the February and *May* numbers of the Journal.

Translate the story into English; then retranslate it into Esperanto. Finally learn the story by heart. Use it as the basis of a question and answer exercise. For example, "Kien la maljunulo alkondukis la azenon?" etc.)

LERTA KNABO. By H. F. DAVISON, Concord School, Concord, Mass.

Mi estas instruisto; malgraŭ tio mi havas okaze ion por brili la malhelajn minutojn de lerneja kutimo. Unu hela minuto venis antaŭ kelkaj tagoj, kiam mi demandis al knabo, "Se bananoj kostas dekok cendojn por ĉiu dekdu, kiom kostos unu dekdu kaj duono?" Knabo ŝanceliĝis iom da tempo kaj fine diris, "Mi pensas, ke se mi povus iri en butikon, mi povus eltrovi la koston. Ĉu vi volas ludi ke vi estas

butikestro?" Mi konsentis, kaj tiu ĉi parolado sekvis.

"Ĉu vi havas kelkajn bonajn bananojn hodiaŭ?"

"Jes, mi havas kelkajn bonojn."

"Kiom ili kostas por ĉiu dekdu?"

"Dekok cendojn."

Liaj okuloj briletis, kiam li diris, "Mi volas havigi unu dekduon kaj duonon. Kiom estos tio?"

International Reviews printed *only* in Esperanto

| | |
|---|--------|
| <i>Internacia Scienca Revuo</i> (International Scientific Review) Price Sm 2,75 = \$1.40 8 rue Bovy-Lysberg, Geneva, Switzerland. | \$1.40 |
| <i>La Revuo</i> —literary monthly—Dr. Zamenhof, Chief Collaborator Hachette et Cie., 79 Boulevard St. Germain, Paris, France. | \$1.40 |
| <i>Tra la Mondo</i> —illustrated monthly “Gazeto Tra la Mondo,” Meudon (S. et O.), France. | \$1.60 |
| <i>Lingvo Internacia</i> —twice a month—with 300 pages of literary supplement annually “Presa Esperantista Societo,” 33 rue Lacépède, Paris (V ^e), France. | \$1.50 |
| <i>Juna Esperantisto</i> (same address) | \$0.50 |
| <i>Espero Pacifista</i> —International Peace Magazine Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly sur Seine, France. | \$1.00 |
| <i>Espero Katolika</i> —Roman Catholic Monthly Abbé Em. Peltier, Ste. Radegonde près Tours (L et L.), France. | \$1.00 |
| <i>Internacia Socia Revuo</i> R. Louis, 45 rue de Saintonge, Paris, France. | \$1.20 |
| <i>Elksport Journalo</i> —Commercial and Technical C. Feyerabend, Gutleutstrasse 96, Frankfurt a. M., Germany. | \$1.00 |
| <i>Esperanto Ligilo</i> —printed in “relief” for the Blind Th. Cart, 12 rue Soufflot, Paris, France. | \$0.75 |

Sample copies of the above mentioned Journals cost one-tenth the year’s subscription. Send U. S. postage stamps for sample copies, and *U. S. Postal Orders* for subscriptions. Use the following form for subscriptions:—

Estimata sinjoro,

Mi deziras aboni la (journal) de la unua de
. (month). Mi sendas poŝtmandaton je \$ por la abono.

(Name)

(Address)

Esperanto: Auxiliary International Language

300 ORGANIZED SOCIETIES—20 JOURNALS

Supported and endorsed by many prominent men in Europe, Asia and America. London Chamber of Commerce holds regular Esperanto examinations.

For general information, for addresses of Esperanto magazines (British, French, German, Russian, Japanese, Polish, Swedish, etc.) and societies, for books, etc., write to the

AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION

BOULEVARD STATION, BOSTON, MASS., U. S. A.

| | |
|---|--------|
| Bullen’s Lessons | \$0.26 |
| Descriptive booklet, pamphlets, etc. | .10 |
| Krestomatío (standard for style), paper | 1.00 |
| “ “ “ cloth | 1.50 |

American Esperanto Journal, sample copy10
Send for price-list; all profits are spent for the advancement of the Esperanto “cause.”

Send two-cent postage stamp for catalogues of the British Esperanto Association and of the Librairie de l’Esperanto (Paris). These are much more complete than that of the American Esperanto Association.

“MI AUDAS VIN”

La unua kanto Esperanta eldonita en la U. S.:
muziko de Sro. Herbert Harris; poemo de Dro.
Leono Zamenhof. Facila por meza voĉo.—

PREZO: FR. 1.75 (35 CENTS); 5 EKZEMPLEROJ, FR. 7.50 (\$1.50)

American Esperanto Association

Boulevard Station, Boston, Mass., U. S. A.

EXAMINATIONS AND CERTIFICATES

In compliance with many requests, the Philadelphia Esperanto Society has prepared an Examination for the Certificate “Atestopri Lernado,” which may be taken by Correspondence, or, Groups and Classes may arrange for a local examination covering a period of two hours. To all who pass will be awarded the beautiful Certificate of the Society, signed by its officers, and under its seal.

The Correspondence Examination will be especially useful to those who have been studying without a teacher. It will systematize their study and is sure to strengthen the weak places

in their knowledge. The time allowed is one month, and the use of text-books is permitted.

The Fee for the Registration is fifty cents, which must be paid before the papers are sent out. When the answers are returned, a further fee of one dollar must be paid. In the event of failure the applicant may repeat the examination by payment of the registration fee only.

A copy of the Correspondence Examination papers will be sent upon the receipt of ten cents. For registration, or for further information, address the Corresponding Secretary, Mr. E. Clive Hammond, 1711 Summer St., Philadelphia, Pa.